



La

Pacdefendanto



N-o.16. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Aprilo.1953.



1948-K.GOTTWALD parolas al popolo.
MORTIS

GRANDA PACBATALANTO KAMARADO Klement Gottwald

La 14.de marto 1953 matene mortis nia kara respublika prezidento kamarado Klement GOTTWALD.La 14.de

junio 1948 li estis elektita kiel unua prezidento laborista en nia respubliko.De presio li estis ĉarpentisto.Jam en sia junago li aktive partoprenis la revolucion movadon.Kiel fondinto de la ĉsl.komunista partio li firme defendis la postulojn kaj rajtojn de la laboristaro.Multfoje li estis bapita kaj arestita de la policio dum la Masaryk-kaj Beneš-respubliko.Kiam en 1939 la germanaj faŝistoj okupis nian landon li rifugis al Moskvo,kie li multe lernis kaj de kie li donis direktivojn kaj konsilojn al nia suferanta popolo.Post la liberigo de nia lando,dank al la oferema Ruga armeo de Sovet-Unio,Gottwald revenis kiel partia prezidento kaj farigis vicprezidento de la registaro.La 14.de junio 1948 kiam perfidaj alipartiaj ministroj inscenis renverson de nia ŝtata sistemo kun la celo nuligi nian amikecon al la Sovet-Unio kaj anstataŭigi ĝin per denova subjugo al okcidentaj kaj usonaj kapitalistaj potencoj,estis Gottwald,kiu alvokis la popolon kaj partion,antaŭavertinte la minacantan dangeron.Gottwald tiam farigis landa prezidento.Bedaŭrinde nur mallongan tempon li direktis nian ŝtaton.Sed li dirrektis ĝin bone,laŭ sia plejbona konscienco.La tuta popolo profunde funbras pro lia subita morto.Ankoraŭ li partoprenis la funebran ceremonion de nia granda instruisto k-do.Stalin kaj pro malvarmo lia pulmo difektigis kaj kaŭzis lian morton.Dum tri tagoj centmiloj da homoj ĉirkaŭpasis lian katafalakon,esprinante la lastan honoron al nia kara prezidento.

Mi respondos al k-do T. Kurisu?

Nia redakcio ricevis de fama proleta japana verkisto leteron el 25. de januaro 1953, el kiu ni prezentas grandpartan eltirajon por instruo, diskuto kaj respondo al niaj legantoj. La letero tuŝas gravajn problemojn, kiujn la redakcio facile povus unuflanke/tendence/respondi. Pro tio la respondoj kaj klarigoj farataj de niaj legantoj donos al la aŭtoro de la letero multe pli klaran kaj konkretan bildon pri la de li tuŝataj problemoj.

.....pro kontanta persekutado Jap. Proleta Esp. Unio ruinigis sed tuj ekstarigis nova movado laŭ populfronta organizmaniero „MARSO“ en Kobe farigis la centra organo kiu mi estis unu el la aktivaj membroj. Denove oni subpremis nian movadon kaj arestis la aktivulojn. Mi mem tiam sidis preskaŭ 2-jarojn en malliberejo de Kobe kaj Osaka. Kiam mi liberigis Japanio jam troviĝis en la mezo de milito kontraŭ Ĉinio. Oni severege observis la movigon de komunistoj kaj kontraŭfaŝistoj. Ankaŭ progresemaj esperantistoj ne faris exception estante kulpigataj pro nura studkursido aŭ ekskursoj. Nek la neŭtrala movado estis favorata. Post la milito ni kun aliaj gek-doj penis demokratiĝi reunigi la tutan jap. Esp.-movadon, sed ni ne sukcesis. Nur mi aktive laboras sur literatura fronto kaj funkcias en la sekretariaro de la Asocio por Nova Japana Literaturo, nia tutlanda organizo de progresemaj literaturistoj. Mi estas ankaŭ membro de ĝia centra komitato kaj prizorgas ĉefe la Internacian kunligon kun progresemaj literaturistoj, kulturaj laborantoj kaj ties organizoj.

Kiam mi sendis miajn tradukojn de la libroj de Fuĉia kaj Drda al vi, mi intencis sendi ĉerpoŝtan leteron kun klarigo antaŭ ol la libroj atingos, sed la intenco ne realigis. Sekve nature vi ne bone komprenis miajn tradukojn. Mi skribis kvazaŭ 100 leterojn estus se mi tradukus aj el esp.-traduko de k-do M. Lukáš. Tio ne estas vero, ĉar mi tradukis la „Raporton el eŝafoto“ el anglalingva traduko (asona) komperante kun Esp.-lingva traduko de la unuaj du ĉapitroj, kiu sendis al mi k-do. Zálupský el kopio de manuskripto, kaj parte el ĉena originalo kiu mi decidis. Mi tiam ne estis pri ekz. de tuta Esp.-lingva traduko. Ĉu efektive k-do. Lukáš tradukis ĝin? Krom tio la libro konsistas krom „Raport.“ ankoraŭ el kelkaj aliaj

verketoj de Fuĉia. Lastaj leteroj el la malliberejo, 10 politikaj artikoloj kaj kelkaj dum la germana okupado, unu diĝono de liaj baptoj dum la Munkena krizo, ktp. Tiujn mi tradukis el rusa kaj angla lingvoj. Mi tradukis „Muta Barikado“n tute el Esperanto. Sed por tio kontribuis ne nur k-do Lukáš, kiu tradukis 8 novelojn, sed ankaŭ k-do Zálupský, kiu iniciatis la laboron kaj tradukis 3 novelojn. Bonvolu korekti, ĉar estas malbone lasi, ke viaj legantoj havu malverajn informojn.

Ankaŭ librojn mi sendis siatempe po kelkaj ekz-oj al via ministerio de informado /k-dino. Hilská/ kaj al k-do. Lukáš, de mi voias kredi, ke vi ĉefministro k-do. Zápotocký kaj la centra komitato de KPC jam estas informitaj pri tio. Mi ne tre enas skribi al centra komitato de KPC, ĉar kvankam mi jam skribis al ĝi, laŭ deziro de k-do Pošepný. Ĝi ne respondis al mi. Krome aliaj eldiroj pri Esperanto, cititaj de vi, estas tiom absurdaj, ke mi sermove dubas, ĉu ili bonvenigos miajn sendaĵojn kaj solre aŭskultos, kion mi pledos por Esperanto. Estas amare el diri, sed tio estas niaj sinceraj vortoj. Mi legis kaj kopiis ankaŭ vian leteron de 4-aprilo 1952 kaj vian let. de 20. moja adresitan k-dino Yamada. Mi interkonsilis kun kelkaj esp.-k-doj el Tokio, ĉiuj malnovaj esp.-veteranoj. Sajnigis al mi, ke ili ne konsideris la aferon tiom serioze kiel mi kaj ke ili ne havas pretan solvon el nur elatendi kaj vidi. Mi tiam preparis la aferon kun k-do. Sigeharu Nakno, mia antaŭa verkisto kaj ĝenerala sekretario de nia Asocio por Nova Japana Literaturo, kiu ne estas esperantisto sed tamen amiko de Esperanto. Li opiniis, ke k-do. Ikao Ojama, nek iuj aliaj jap. eminentaj neesperantistaj k-doj, skribos al via centra komitato de KPC antaŭ ol ili estos bone informitaj pri la fakta aferstato ĉe

vi. Sed vi kvazaŭ malpermesas, ke ni konigu la veron pri la Esp-movado en via lando al plivastaj rondoj. Informi tiujn eminentajn k-dojn., signifus diskonigi la aferon, ĉar ili estas vaste ligitaj kun diversaj popolrondoj en Japanio. Krome povas okazi, ke kiam ili estos bone informitaj pri la vera stato de la Esp-movado en via lando, ili hezitos sin esprimi publike, des pli skribi al viaj aŭtoritatuloj por afero evidente malfavorata, prave aŭ ne prave, de la registaroj kaj kompartioj de Sovetio, Ĉeĥoslovakio ktp. Mi dubis kaj ankaŭ nun dubas, ĉu trovigus en Japanio kaj eble ankaŭ en aliaj landoj neesperantista eminentulo, kiu pretas riskisian reputacion por la afero, kiam li ankoraŭ ne bone konas. Do mi ne plu parolis pri la afero kun aliaj neesperantistaj k-do-eminentuloj. Kaj mi nen daŭrigis pensadon mirante, kial okazis, ke Esperanto estas malfavorata de aŭtoritatuloj, ne nur en Sovetio, sed ankaŭ en Ĉeĥoslovakio kaj versajne ankaŭ en aliaj popoldemokr. landoj de Eŭropo, ĉar ja devus esti tute inverse!

Mi legis en „HEROLDO“/1. nov. 52./ artikolon sub titolo „Kie la Esp-movado estis ĝis nun la plej forta“. Ĝi informas inter alie: „La 6. de septembro/resp. la 7an matene je 0.30 horo/post longa, tre vigla kunveno, la Esperanto-Asocio en Ĉ. S. R. akceptis unu el la du donitaj alternativoj“, sed nun mi komprenis, ricevinte la lliston de „LA PACDEFENDANTO“, ke ili estis „deviga disigo“ kaj „lenuola likvido“.

Tio renemorigis nin pri la metodo aplikita dum la lasta milito de la japana faŝista registaro kontraŭ kulturaj organizoj. Vere granda estis nia miro kaj mi ne povis nekonsenti kun la vortoj de k-do. Hejda: „Se ne estus fakto, ke tiel okazis, ni ne kredus! Neniam en nia vivo ni estus imaginta, ke foje venos tempo kaj la Esperanto-Movado estos likvidota - de socialista registaro.“ Se oni volas likvidi Esp.-asocion, oni tion faru malkaŝe, publikigante la kialon, sed ne hipokrite agu kvazaŭ tinante publikan jugon. Estas ne tolerebla, ke registaro, kiu sin nomas popoldemokrata aŭ socialis-

ta apliku faŝist-similan metodon! Nun mi volas studi pri viaj leteroj. Laŭ viaj 3 leteroj mi konstatas jenajn punktojn: 1/Viaj gvidantaj k-do-ĉefoj konfesi ĉe abunda dokumenta materialo, ke via laboro estas altvalora por la defendo de la mondopaco, propagando de socialismo kaj via regimo. 2/ Sed laŭ ili estas ne dezirinde uzi por tio Esperanton, kiu ne konformas kun la lingvo-teorio de k-do. Stalin kaj kiu estas lingvo kosmopolita, de kapitalistoj. 3/en uzinaĵoj kaj urbaj kulturaj klyboj, kiujn vi estis devigitaj aligi, kiel Esp-rondetoj pro likvidigo de via asocio, vi renkontigis ĉie kun simpatioj kaj helpemo, ĉar ili ankoraŭ ne estas informitaj pri la intencoj, kiuj minacas al via movado flanke de superaj instancoj. Laŭ 1/ kaj 2/ mi devas fari konkludon, ke viaj aŭtoritatuloj ne deziras, ke vi uzu Esperanton nek por la interesoj de via popolo, por mondopaco kaj socialismo, simple pro tio, ke Stalin estas kontraŭ Esperanto. Certe Stalin estas granda homo, sed ne estas scienco, trakti lin, kvazaŭ li estus Dio, ĉioscia kaj ĉiopova. Ja eĉ Stalin povas erari, ĉar kiu homo estas absolute imuna kontraŭ eraroj? Cetere, Stalin nen klare neas la klasecon de lingvo k estas ne scienco apriorie kondanni Esperanton nomante ĝin malprave lingvo kosmopolita, lingvo kapitalista ktp. La demando estas ĉu Esp-o estas efektive utila al tutmonda proletaro, por mondopaco kaj socialismo. Se la respondo estas „jes“, oni ĝin subtenu kaj bone utiligu kiu ajn/eĉ Stalin/malaprobu ĝin. Se la respondo estas „ne“, forjetu ĝin, kiu ajn/eĉ Stalin/aprobu ĝin. La afero ŝajnas al ni tute klara. Neniu komunisto aŭ socialisto kontraŭdirus pri la neceso de internacia komprenigo kaj amikigo inter ĉiulandaj laboristoj. Tio povas nuntempe efektiviĝi plejbone pere de internacia korespondado senpera, kaj Esperanto estas la plej facila kaj efektiva, se ne la unika, lingvo por tia korespondado. Tio jam estas pruvita fakto. Do tiuj elpaŝas kontraŭ la apliko de Esperanto por tia tre laŭdin-

-da celo, sin montras kiel strangaj komunistoj aŭ socialistoj. Do vi estas prava kiam vi skribas: "... tiam armilon forpuŝi el niaj manoj absolute ne povas esti inda al komunistaj gvidantoj. "Mi tute aprobas ankaŭ viajn jenajn vortojn: "... de nia laboro ne dependas nur la ekzisto de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio, sed efektive la Esperanto-movado de ĉiuj popoldemokrataj landoj, eĉ la tutmonda. Nia venko estas venko tutmonda kaj nia malvenko estas malvenko por nia tutmonda movado. "Ja mi kuragus diri, eĉ malvenko por la monda pacmovado kaj socialismo, ĉar estas ja la faŝistaj ŝtatoj, kiuj timas interkomprenigon de proletoj, malpermesante disvastigon kaj instruadon de Esperanto. Ni mem do ne povas toleri, ke niaj gvidantoj same agu! Ĉu efektive kido Zápotocký skribis responde al via plenda letero, kiel vi citas al mi, nome: "Esperanto ne estas lingvo kaj la vortoj de kido Lenin, kiu diris: „Esperanto povus esti la latina lingvo de la proletaro" jam ne valoras, la tempoj pasis, de tiam multaj jaroj. El Rusio farigis granda socialista unio, el kiu ĉiuj nacioj prenas ekzemplon kaj ankaŭ lernas la lingvon de socialistaj pioniroj: Lenin kaj Stalin, kiu farigis lingvo de tutmondaj pacbatalantoj, la rusan!" / Rim. de red.: Ne kido Zápotocký, sed la presidio de lia kancelario respondis tiel en lia nomo. Laŭ via letero mi ne klare vidas, al kiu tiuj vortoj apartenas, ĉu al kido Zápotocký aŭ al viaj oficialuloj, pri kies kontraŭesperanta starpunkto vi plendis al kido Z-ý. Se kido Z-ý efektive eldiris ilin, tio estas grava disiluziigo por mi, ĉar mi konsideris lin gis nun kiel naturan komunist-gvidanton. Mi ne neas la neceson lerni la rusan lingvon por konatigi la Marks-Leninisman literaturon kaj ekkoni la spertojn pri socialista konstruado en Sovet-Unio/ni mem jam de longe studas la rusan lingvon kaj eĉ tradukas el ĝi, sed mi tute ne povas konsenti, ke ĝi fariĝos lingvo de tutmondaj pacbatalantoj. Krom tio, kial simple forpuŝi Esperanton, kiu jam nun povas plenumi kaj parte plenumas la rolon de speco de "lingvo de tutmondaj pacbatalantoj"? Pardonu, se mi uzis tro ak-

rajn vortojn kontraŭ viaj gvidantoj, sed mi ne povis ne eldiri ilin, ĉar tiom absurdaj ŝajnis al mi iliaj vortoj.

En viaj leteroj kaj en LA PAC-DEFENDANTO/kaj se mi ne erare memoras ankaŭ en franca ESPERANTISTO LABORISTA/ke la Stalina lingvo-teorio ne kontraŭas Esperanton. Estas vero, ke li en siaj artikoloj ne esprimas sin rekte kontraŭ Esperanto. Li nur alludas pri estonta internacia lingvo, kiu estos nek germana, nek rusa nek angla, sed io nova. Estas bela profetaĵo, eble ankaŭ gusta. Sed kial ne subteni jam ekzistantan internacian lingvon Esperanto? Li kvazaŭ malaprobas Esperanton kaj prisilento, kaj la longjara kontraŭesperanta praktiko en Sovet-Unio suspektigas min, ke oni estas efektive kontraŭ Esperanto. Kial la Sov. registaro tiom obstine rifuzas Esperanton, estas granda enigma por mi. Ĉu iu timas, ke la popolamasoj en Sovetio rakontu la veron pri sia vivo al siaj eksterlandaj fratoj kaj eksciuj la veron pri la vivo ilia pere de senpera internacia korespondado? Povas esti tiel, ĉar oni malpermesas aŭ malfavoras tre verŝajne al la ordinaraj Sovetianoj senpere korespondadi kun eksterlandaj kidoj. ne nur per Esperanto, sed ankaŭ per aliaj lingvoj. Kiel do oni povas klarigi ĉi fakton? Eble per misuzo fare de malamikoj! Sed ĉu ili, la malamikoj, ne posedas pli efikajn rimedojn por tiaj subfosaj celoj ol internacian korespondadon? Ĉu eventuala malutilo ne povas esti kontraŭagata per singardemo de la popolamasoj kaj eble ankaŭ per cenzuro, se nepre necese? Ĉu la internacia korespondado fine ne alportas al la popolo kaj ĝia registaro multe pli da utilo ol malutilo vaste diskonigante la veron pri si al eksterlando kaj tiel akirante fortan subtenon de eksterlandaj popolamasoj? Estas jam tede okupigi pri tia argumentado. Ekzistas nenia konvinka klarigo pri la malfavorado de Esperanto kaj la senpera korespondado flanke de la soc. registaroj. La fakta malekzisto de Esperanto-movado en Sovetio treege malfavore influas la tutmondan Esperanto-movadon kaj la malfavorigo de Esperanto en preskaŭ ĉiuj popoldem.

landoj plie plifirmigas la impreson, kvazaŭ Esperanto kaj komunismo ne povas ekzisti kune. En tia aferstato ne plu estas ebla efika propagando de Esperanto en komunistaj kaj komunist-anikaj rondo.

Estas nepre necese, ke ni gisfunde diskutu pri tiu ĉi problemomondskale, jam kaŝante nenion, sed publikigante la veran aferstaton, ĉar sen tio jam la publiko ion suspektas. Mi mem gis nun kaŝadis la veron ne nur antaŭ la neesperantista publiko, sed eĉ antaŭ la esperantistaj anasoj mem en Japanio, tiamante, ke la malkaŝo de la vero seniluziigos kaj malkuragigos ilin kaj malutilos al nia afero. Sed nun mi vidas, ke plua kaŝado de vero povus pli malutili ol utili, ĉar tio malhelpas fundan diskutadon kaj sekve gustan solvon. Do mi decidis fari detalajn raportojn al la esperantista kaj al la neesperantista publiko, alvokante ilin partopreni la diskutadon por gusta solvo de la problemo, kiu havas gravan signifon ne nur por la sorto de Esperanto, sed ankaŭ por la sorto de la tuta homaro. Tiucele mi nun kolektas dokumentan materialon, kaj mi petas vin, provizi min per gisnunaĵoj de "La Pacdefendanto", ĝirkuleroj, rezolucioj, alvokoj ktp. Ĉu vi ankoraŭ nun malpermesas la malkaŝigon de la vera aferstato de Esp-movado en via lando?/ne plu/ Mi tute bone komprenas vian motivon/ĉar, mi mem agis gis nun same kiel el vi/ sed kiel mi skribis supre, al mi ŝajnas, ke jam venis la tempo ke ni malkaŝu la veron antaŭ la publiko. Komprenoble, necesas agi takte kaj ne troigi.

Se viaj oficialuloj ne favoras la uzon de Esp-o eĉ por progresaj celoj mi ne estas certa, ĉu ili bonvenigas nian peresperantan laboron por diskonigo de via literaturo. Tio certe ne estas entusiasmiga por mi, nek por iu alia eksterlanda esp-isto, kiu emas traduki viajn literaturajn verkojn pere de Esperanto, ĉu ne? Ĉu tio ne estas eĉ kontraŭ la interesoj de la vialanda popolo? Eble vin interesus jena fakto: Antaŭ ne longe mi ricevis per karton de juna studento de ĉina lingvo en Kobe. Li informis min, ke li sendis miajn jap. tradukojn de libroj de Fuĉik kaj Drda al sia ĉina korespondanto en Peking, kiu

verŝajne scias Esp-on kaj japanan lingvon, ĉar li petis de sia japana korespondanto, juna studento en Kobe, ke li sendu, se eble, ankaŭ la esp-ajn tradukojn por ke li povu studi Esp-on kaj japanan lingvon per komparado. Bedaŭrinde mi ne povis kontentigi la ĉinan k-don, ĉar ili ankoraŭ ne estas eldonitaj.

Mia unua korespondanto en via lando estis k-do. Inrich Zálupský, redaktoro de slovaka sindikata ĵurnalo "PRÁCA". Dum preskaŭ 2 jaroj ni tre vigle korespondadis, sed subite li ĉesis skribi al mi kaj ne plu donas vivsignon. Mi supozas, ke lin trafis granda senilusionigo, kiam via Ministerio de informado ne aprobis eldoni slovakajn tradukojn de japana proleta romano "Krab-ŝipo" kiun li tradukis el nia Esp-lingva eldono. La kialon de la malaprobo mi ne scias, sed mi forte suspektas, ke la fakto, ke tenis pri peresperanta traduko influis ĉi decidon. Ĉiuokaze k-do Zálupský malaperis el nia vido kaj verŝajne ankaŭ el la Esp-movado. Mi ege bedaŭras, ĉar el liaj leteroj mi multe lernis pri la efektiva situacio en via lando. Mi tre ŝatus renovigi kontakton. Li loĝis en Bratislava kaj laste en Košice, Benešova ĉ. 31. Espereble la k-do el Košice povos informi min pri lia sorto. Mi estus tre dankema.

Mi ŝatus scii, kia nun efektive estas la situacio en via lando ĉe popoldem. regino, kiel la popolo efektive vivas kaj laboras kaj kiel la popolanoj efektive pensas pri tiu aŭ alia afero. Mi ĉiufoje aldonis la vorton "efektive", ĉar kiel literaturisto mi ne tre fidis oficialan propagandon. Mi preferas aŭskulti rekte ĉe la popolo. Ĉu vi povus skribi al mi pri tiuj aferoj kiel unu el la popolanoj? Mem mi farus same koncerne la japanan realeco, ĉar mi ne kredas, ke vi estas sufiĉe bone informitaj pri ni.

Kiam mi legis, ekzemple Koninforma organo "POR DAŬRA PACO KAJ POPOLDEMOKRATIO", ne ĉian guste informas pri la okazintaĵoj en nia lando. Mi mem ne povas pretendi, ke mi povas ĉian informi pri la vero, sed mi almenaŭ penas sincere skribi tion, kion mi spertas kaj opinias. Mi volas kredi, ke via registaro ne timas, ke oni skribu la veron pri

via lando. Mi malamas malveron kaj amas la veron pli ol ĉion. Pere de Esp-o mi volas ekscii la veron pri via lando, ĉu la popolo efektive pli bone, pli feliĉe kaj pli libere vivas dum popoldemokr. reĝimo ol ĝi vivis dum la antaŭaj reĝimoj. Mi opinias necese, priskribi niajn efektivajn realojn tiel, kiel ili efektive estas kun iliaj bonaj kaj malbonaj flankoj, se tiaj trovigas. Se mi povus havi tiajn realajn priskribojn kaj opiniojn pri via landa vivo, mi povus traduki ilin por niaj legantoj, montrante praktike la utilecon de Esperanto. / nia redakcio intence supersaltas parton de la letero kaj daŭrigas / denove, venis nenia respondo. De tiam vekigis ĉe mi malfidemo al li, kvankam li estis la prezidanto de via Esp-asocio kaj sciis skribi pompajn artikolojn. Kia persono li estas kaj kiel maniere okazis, ke li okupis tian altan postenon?

Mi esperas, ke mi povos baldaŭ korespondi aerpoŝte, sed dume mi devas kontentigi per ordinara korespondado. Kvankam mi eldonigis 2 librojn, tio ne multe helpis al mi materiale, ĉar niaj eldonejoj nem estas malriĉaj. Mi vivas kvazaŭ senlaborulo kaj la vivo de mia familio nun dependas ĉefe de la salajro, kiun perlaboras mia edzino kiel kudristino en hospitalo fondita de KPJ. Mi ne povis elĉerpi ĉiujn temojn, pri kiuj mi volis skribi al vi, sed pri ili mi skribos venonte se vi konsentas korespondadi kun mi. Mi finas kun la espero, ke vi bonorde ricevos ĉi leteron kaj ke mi povos baldaŭ ricevi vian respondon.

Elkorajn salutojn al vi, viaj familianoj kaj ĉiuj gekamaradoj en via lando, batalantaj por la paco, libereco kaj vero!

kamarade via T. K u r i s u
Himonya 2-2298, Meguro-ku, T O K I O

La redakcio esperas, ke multaj niaj legantoj skribos realan informon al k.do. Kurisu kaj samtempe petas ricevi kopiojn de tiuj respondoj, kiujn ĝi laŭ ebleco publikos en LA PAĈDEFENDANTO. Memkompreneble k.do. Kurisu ricevos ankaŭ klarigan informon de nia redakcio koncerne la demandojn, tuŝitajn en sia letero.

ESPERANTO HELPOS AL LA PAĈO? SE LA POPOLAMASOJ ĜIN UZOS POR ĜIA VENKO

Ĵ U S A P E R I S

Emil Klinsza: por Ĉeĥoj, praktika LERNOLIBRO de internacia lingvo
E S P E R A N T O

.....
por kursoj kaj nenlernantoj. Kompilita laŭ plejnova metodo en 18 lecionoj kaj ekzercadoj, por konversacio kaj kun ŝlosilo.

Unua eldono: Formato 30x21 cm. 56 pagoj, ciklostilita. Prezo 45.-Kĉs
Mendu ĉe: Esperanto-rondeto k-do Emil Klinsza, DOLNÍ SUCHÁ II. Slezsko, Ĉeĥoslovakio.

NE ATENDU, SED TUJ MENDU !!!!!!!
La redakcio recenzas:

Post kontrolo de la ricevita lernolibro mi povas konstati, ke fakte tenas pri tre taŭga instruilo, perfekta kaj jam de longe de niaj legantoj sopirata. Ni admiras la persistan kaj korektan penan ellaboradon de nia k-do E. Klinsza kaj nur ni devas konstati, ke kron la enhavo de ĉeĥosl. ŝtata himno kaj la himno de esperantistoj estas dezirenda en la venonta eldono ankoraŭ aldoni "La Internacion" kaj kanton de pacdefendantoj.

E L P O P O L A Ĉ I N I O

.....
Post plendo de la peranto k-36. Rud. Burda ĉe la gazetvendejo ORBIS en Praha, tiu ĉi respondis la 28. de marto, ke Ĝi ne povis ankoraŭ liveri al la abonantoj la januaran n-on., ĉar la sendaĵo ankoraŭ el Pekingo ne alvenis al Praha. La malfruigon verŝajne kaŭzis la ŝango de la ekspedicio, pro tio la abonantoj estas petataj pri toleremo.

Laŭ lastaj informoj el Pekingo ne eldonigos la pronesita kalendaro por 1953 pro teknikaj kaŭzoj, sed la eldonejo rekompencos ĉiujn abonantojn per interesa E-lingva broŝuro. La peranto

V I V U Ĉ U E N-LAJ kaj KIM IR SEN

.....
Kun ne imagebla gojo mi eksciis pri la decido de k-do. Ĉu En-laj kaj Kim Ir Sen koncerne la interŝango de militkaptitoj, kiun ni taksas gravan kontribuon ne nur por la sopirata paco en Koreio, sed samtempe firmigo de la paco tutmonda. Ilia decido alifortigu ankaŭ nin en nia batalo por la paco!

N i a n o v a d o ĵ ě n Ć e ĥ o s l o v a k i o

PŘEROV, komuna konferenco de regionoj Ostrava kaj Olomouc okazigos la 23-24. de majo 1953 en Přerov. La 23. je la 19. horo okazos interkonatiga vespero en restoracio de Komunální podniky en parko "Michalově". Dimanĉe je la 8. en la sama ejo estos laborkonferenco de la delegitoj de Esp-rondetoj el ambaŭ regionoj. Posttagmeze ekskursoj. En la intereso kaj por la firmigo de nia movado necesas ke ĉiuj gekonferencadoj eĉ gastoj partoprenu.

BRNO, k-do. Josef Balay skribas: La afiŝoj pri la packongreso en Pekino, kiujn ni pendigis sur la muro en nia uzina mangejo vekis grandan intereson ĉe pentro-artisto. Li petis min, prupti la afiŝojn por ekspozicio en generala kunveno de noraviaj artistoj, kie oni studis la ĉinan pentro-arton. Poste estis la afiŝoj montritaj en lernejo kun la surskribo "Senditaj pere de ĉiniaj esperantistoj. K-do. B. mendis plurajn afiŝojn por propagandi Esperanton kaj la pacon.

KLATOVY, kurson por 25 komencantoj bone gvidas k-do. profesoro Karel Behenský, malnova kaj oferema esperantisto. Nova kurso estas preparata. Propaganda materialo estas regule ekspoziciata en vitrokesteto.

LANŠKROUN, la ekspozicio "Tutmonda klasbatalo" akirita per Esperanto, daŭris 1 semajnon en uzino TESLA, kie ĝin vidis preskaŭ 1.000 laboristoj. Al ĉiuj la ekspozicio treege plaĉis kaj ti-kiuj konsideris Esperanton kiel kosmopolitan lingvon tuj devis ŝangi sian opinion. Sekve al nia rondeto la ekspozicio gajnis multajn kunlaborantojn. Ĉiuj politikaj funkciuloj venis al ni renkonten, nia afero sukcesis. La ekspozicio multe helpis propagandi la mondpacon kaj interpopolan fratigon.

SKORONICE-KYJOV, en tiu vilago, kiu nombras 500 loĝantojn, ni estas nun sola esp-isto. Vane ni klopodas gajni plurajn adeptojn. Oni estas komforta eĉ por lerni la rusan lingvon. Mi sola propagandas Esp-on, ĉefe per afiŝoj sur muro en la loka biblioteko, kies estro mi estas. Nur unu sukceson mi atingis, nome, ke ĉiu vilagano scias kio estas Esperanto kaj la verda stelo. En Kyjov estas ankaŭ kelkaj esperantistoj, sed tu-

te pasivaj, nur p.n. kolektantoj.

M. Lunga
HRADEC KRÁLOVÉ, ni denove kaj plimultnombre kunvenas en stacidoma klubejo ĉiun lan kaj 2an merkredon en la monato de 19. ĝis 21. horo. Laŭ postulo de nia patron-organizo ROH/revol. sindikato/ni estas devigataj arangi ankaŭ kurson de rusa lingvo.

PLZEŇ, la ekzisto de nia rondeto ĉe la Urba kleriga klubo/Os. Bes./ nun pendas kvazaŭ sur fadeneto. De ĝi ni ricevis leteron kun sciigo, ke la Distrikta kleriga komitato postulas likvidon de la Esp-rondeto je la 31. de marto kaj rekomen- das al ni, lerni kaj propagandi la rusan lingvon. Samtempe oni forprenas nian klubejon kaj la tutan posedadon, kiun ni ankoraŭ kiel grupe de EACSRO aĉetis por niaj kotizoj kaj donacoj de la membroj. Certe nia komitato ankoraŭ la saman tagon post ricevo de ĉi letero /24/3./ sendis al la urba konsilantaro protestleteron kontraŭ la senkaŭza likvido. Ĝi ankoraŭ ne estis pritraktita, sed ni tute ne fidus je ia sukceso, ĉar la likvido okazis laŭ rekomeno de la urba komitato de la komunista partio. Tamen ni forte kredas, trovi novan vojon por povi daŭrigi nian proletan k. porpacan devon.

SVIT-Slovakio, ĉiu ĵaŭde de 20. horo ni kunvenas en uzina klubejo de ROH -Spol. dom. Ni legas kaj tradukas artikolojn, esplikas gramatikon kantas kaj diskutas pri en-kaj eksterlanda Esperanto-novado. En la ŝtata lernejo por instrui laborrezervojn/ŝtát. učiliště prác. záloh/ estas granda intereso por Esperanto. Tie funkcias kurso por komencantoj, kies nombro atingas 50 personojn. La estro de la lernejo permesis instrui al la lernantoj Esperanton du foje semajne po du horojn.

A T E N T I G O

En revuo por uzinaj kluboj "KLUB" de 3. marto aperis artikolo de profesoro Trávníček, signalizante al likvido de Esp.-rondetoj. Legu ĝin kaj ne prokrastu skribi protestleteron al la koncerna redakcio. Prof. Trávníček ne rajtas paroli pri E., ĉar li ĝin tute ne konas nek studis.

Hruela Bato Kontraŭ LA PACDEFENDANTO

Post la likvido de nia E-rondeto en Plzeň perdas ankaŭ LA PACDEFENDANTO sian legan fundanenton, ĉar nek ne regulan informilon, kiel ni gis nun prezentis nian bultenon, rajtas eldonadi unuopulo, sed nur iu organizo aŭ grupo. Ankaŭ ne eblas plu uzi senpagan poŝtafrankon, kiun gis nun pagis por ni la Urba Kleriga Klubo. Sed ne estu malgajaj, karaj legantoj, ni jam sukcesis gustatenpe solvi ĉi malagrablajn problemojn dank al nia kara kaj tre vigla k-do. Vladimír MOHAPL el Olomouc, kiu en nia senhelpeco respondas per jenaj kuragigaj vortoj:

"...tio signifas, ke ni por nenia prezo povas allasi, ke pro kelktempa nekomprenejo flanke de iuj funkciuloj en Plzeň ĉesigu la eldonado de La Pacdefendanto. Se vi fakte ne plu trovos eblecon eldoni la bultenon sekve de tio, ke la urba konsilantaro en Plzeň ne decidus ŝangi la proponon de distrikta kleriga komisio kaj neniu alia rondeto pretus daŭrigi vian agisnunan laboron, ni provos tion arangi en Olomouc....."

Jen vere merito inda pacbatalanto al kiu ni esprimas en la nomo de niaj legantoj nian sinceran elkoran dankon en la espero, ke li ne restos la sola kaj la tuta laboro nur sur liaj ŝultroj. Ni kredas, ke jam nun aligos pluaj grupoj aŭ individuoj, kiuj post paso de certa tempo, se necese, de nove daŭrigos tiun ĉi gravan porpacan laboron. La redakcio restas en Plzeň kaj ĝi kunlaboros kun la eldonejo Olomouc.

B O N A N P R O P A G A N D O N vi povas fari, se vi sendos serion de 7 grandaj fotoj pri granda Esp. porpaca ekspozicio okazinta lastatempe en OSTRAVA kaj vidata de pli ol 2.000 homoj. La serio kostas 140 Kčs aŭ 28 respondkuponojn. Mendu ĉe K-do. František LIČKA, OSTRAVA-Zábřeh Březí ul. č. 12, Ĉeĥoslovakio.

G O J U G E K A M A R A D O J

La naja n-o. de nia bulteno jam a-

KORESPONDI DE ZIRAS:

K O R E S P O N D I necesas!

K-do. Rikizo UZITA, 366 kuinoso, WAKAYAMASI, Japanio, kun ĉiuj landoj pri divers. temoj. Let., p.k.il.
K-do. Curt KESSLER, Aug. Bebelstrasse 28/II. /10a/KLOTZSCHE-DRESDEN, DDR Germanio, k.ĉ.l. pri pacnovado kaj socialismo./Marksismo/.
K-do. Harakuni EGAVA/14 jara knabo/279 Minami Nakazin, WAKAYAMASI, Japanio-Nippon, pri popolaj kutimoj kaj moroj. Interŝang. p.n., p.k.il.
K-do. Josef STANEK, redaktoro de ĉsl. presservo, ČTK. Spojovací 209/16, PRAHA, Ĉeĥoslovakio, koresp., interŝ. uzitajn p.n. Speciale interesas pri marioneta teatro. Scias anglan, germanan, francan, rusan kaj judan lingvon. Certe respondas.
K-do. Attila ASKALÓS/12 jara knabo/Ságványi Endre, 3 bk, PECS-Gyárvaros Hungario, per bildkartoj interŝ. pn.
K-do. Ernő DIÓSI/13 jara studento/Arany utca János 9, PECS-Mecsekszabolcs, Hungario, interŝ. bildkartojn kaj p.n. kun ĉiuj landoj.
K-do. Minko OZLCEV BERBEROV, KLISURA, KARLOVSKO, Bulgario, pri idea vivo kaj diversaj temoj.
K-dino. Libuše POSPIŠILOVÁ, nár. podn. BROKÁT 02, RYMAROV, Moravio, Ĉeĥoslov. kun gekanaradoj el ĉiuj landoj.
K-dino. Jarmila SKRIVANOVÁ /23 jara/ vendistino/Vrbova 53/4, KLATOVY, Ĉeĥoslovakio, kaj interŝ. il.p.k. kun ĉiuj landoj. Certe respondas.
K-do. Arnošt CERMÁK, Vankova č. 399, KLATOVY, Ĉeĥoslovakio, kaj interŝ. il.p.k., uzit. p.n. kaj Esp-glunarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondas.
K-do. Bohuslav NÁDVORNÍK, teknikisto/Poštovní úřad, LITOMYSL, Ĉeĥoslovak. kaj interŝ. uzitajn k neuzitajn p. n., il.p.k., filatel. gaz. kaj JAZZ-muziknotojn kun ĉiuj landoj.

peros kun bela verdkolora kapotito presita en presejo. Por niaj eksterl. gek-do. ĝi farigos multe pli reprezenta propagandilo, precipe en popoldan. landoj. Dume ĉe ni, ni restu nun silentaj kaj ne fanfaronu antaŭ neesperantistoj!

Eldonas: O s v ě t o v á b e s e d a - ESPERANTO-RONDETO en PLZEŇ
Redaktas: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, en P L Z E Ň
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O